

NOVA SEZONO VOKAS!

Aŭtuno en la vivo de ĉiu esperantista aktivulo signifas starton en novan laboron. Post libertempa ripozo multo estas preparenda kaj prizorgenda.

Ek de certa tempo esperantista vivo en Ĉeĥoslovakio de stagno transiris al sufiĉe larĝa kaj grandskala laboro. Kursoj en plej diversaj lokoj donis al centoj da novuloj eblecon kunlabori por paco kaj mondharmonio. Konferencoj ĉu regionaj aŭ interregionaj signifas pliprofundigon de la laboro en tereno. Someraj kursoj eĉ dum la plej varma sezono ne volas permesi interrompon kaj disfloriĝis je entreprenoj atentataj internacie. Niaj artistoj, verkistoj, poetoj dokumentas la plej grandan aktivecon bone pritaksante sian gravan devon!

Sed ek de septembro „civilularo“ kutimas interesiĝi pri plej diversaj kursoj, i. a. ankaŭ pri kursoj de la Internacia Lingvo. Kaj estas ja nia grava devo serioze fari ĉiujn preparojn, kunage kun la klerigas institucioj trovi taŭgajn lernejojn, kvalitajn instruistojn, garantii iliajn honorariojn, entrepreni seriozan propagandon. For estas jam la tempo, kiam nia porpaca laboro estis barita. Kontraŭe: pluraj niaj rondetoj sciigas la ricevon de konsiderinde altaj sumoj de siaj „patronoj“, disponigon de belegaj senkostaj klubejoj kaj ceteraj avantaĝoj, kiuj rekte vokas: eluzu la eblecojn kaj ne perdu la okazon – **neniu malhelpas vin!** Ne tiom grava ja estas, ke mankas ankoraŭ nia centra organizo. Ankaŭ ĝi estos! Ni montru, ke nia movado estas tiom forta, ke ĝi nepre bezonas centran organizon!

El viaj kursoj kresku centoj da novaj firmaj kaj harditaj porpacaj kunlaborantoj sub devizo: ne kunu pli granda loko en Ĉeĥoslovakio sen esperantisto!

Ek en la laboron!

AMKANTO DE AMAZONA INFANINOJ

(El la „Diverskolora Budedeto“)

Rudá, Rudá,
loĝanto de l' ĉiel',
de l' pluvo vi amik',
mi nun petegas vin:
faru ke l' amat'
sentu amon nur al mi,
kaj ne al aliaj virin',
kaj ĉi nokte li vizitu min!

Tradukis el la tupia lingvo F. V. Lorenz
(„Rudá“ estas la tupia nomo de Amoro, dio e la amo.)

Josef Vitek, prezidanto de TKKE.

ESPERANTISTA KLUBO en PRAHA kunvenas ĉiumerkrede en Praha 2, Ve Smečkách 26 je la 20-a horo. De la 19-a horo perfektiga kurso gvidata de A. Slanina.

Junularo krome kunvenas ĉiumarde en Praha 2, Krakovská 21/III-a etaĝo je la 19-a horo.

POPOLA UNIVERSITATO HONORE AL 70 JAROJ DE LA INTERNACIA LINGVO
KAJ 40 JAROJ DE MORTO DE L. L. ZAMENHOF.

II-a parto.

Septembro:

- 4. 9. Josef Víttek: Malfermo de la II-a parto de Popola universitato.
- 11.9. Joŝko Staněk (Praha): Telegrafaj perloj
- 18.9. Vlad. Janouš (Ostrava): Danĝero de atom- kaj hidrogenbomboj (lumbildoj)
- 25.9. Libera tribuno de klubanoj

Oktobro:

- 2. 10. Rudolf Hromada (Praha): temo ne anoncita
- 9.10. MUD-ro Josef Černý (Litoměřice): Seksuala biologio (kun lumbildoj)
- 16.10. Pavol Rosa (Bratislava): temo ne anoncita
- 23.10. D-ro Tomáš Pumpr (Praha): Bapto de caro Vladimir – daŭrigo.
- 30.10. Libera tribuno de klubanoj

Novembro:

- 6.11. Miloš Lukáš (Hradec Králové): 40 jaroj de la Granda Oktobra revolucio
- 13.11. Theodor Kilian (Třebíč): Bonhumoraj travivaĵoj en Hispanujo (lumbildoj)
- 20.11. MUD-ro Ludevít Izák (Martin): temo ne anoncita

Decembro:

- 4.12. Zdeněk Hršel (Hradec Králové): Fonetiko de Esperanto
- 11.12. Tutjara bilanco de la Popola universitato
- 18.12. Solena vespero de la Verda ĉaro de Julio Baghy
- 25.12. Festotago. Kunveno ne okazas.

GRAVA ATENTIGO!

INFORMU INTERESULOJN! Ek

de komenco de oktobro nia Osvětová beseda (Kleriga kunularo) aranĝos tutvintrajn kursojn de la Internaci alingvo. Aliĝojn (skribajn aŭ telefonajn 24 92 35) akceptas Osvětová beseda ONV2 Praha 2, Štěpánská 61-Lucerna aŭ la kasistino de la Esperantista Klubo s-anino Anĉi Bárochová, Praha 2, Sokolská 17. Kurso estos po 90 minutojn ĉiusemajne: por infanoj, komencantoj kaj progresintoj. Instruos en lernoĉambroj de OB en Lucerna konataj lektoroj.

NIAJ MEMBROJ KAJ AMIKOJ.

Geedzoj Jan kaj Sáša Neumann (Strážní 21/1336 Praha XI – Žižkov) sciigas al ĉiuj legantoj de la Bulteno, ke naskiĝis al ili la 16-an de junio la filo Jan. – Ili akceptu niajn sincerajn bondezirojn!

--

La 2-an de septembro post longa malsano en Nový Bydžov mortis longjara samideano Jan NOSEK, emer. direktoro de sukerrafinerio en Skřivany. Li ĝisvivis 68 jarojn. Speciale en Skřivany li dediĉis sin plenforte al nia movado kaj lia tiama senlaca penado estis vaste konata. Lia edzino kaj parencoj akceptu nian profundan kunsenton.

TKKE

Same doloriga estas la perdo de fervora samidano A. NIEMCZYK el Třinec, kiun adiaŭis ĉe la entombigo vasta samideanaro el la tuta regiono. La servo de TKKE per medikamentoj dum lastaj monatoj bedaŭrinde ne helpis savi lian vivon. La familio akceptu nian kondolencon.

TKKE

--

Kara Miloš Lukáš, nia bona amiko!

Pasis 10 jaroj de tiu vere neforgesebla antaŭvespero, kiun grupeto de viaj kunlaborantaj amikoj en Hradec Králové travivis en Via ĝardeno. Malgranda tiama donaceto nur ete esprimis niajn sincerajn sentojn kaj grandan estimon.

Tiam Vi estiĝis 50-jarulo... Kaj nun, la 15-an de septembro Vi festas la 60-jariĝon. Dissemitaj en la tuta mondo viaj geamikoj denove venas por diri al Vi kiel kara Vi estas por ni ĉiuj. Via vivo kaj granda verko estas potenca voko de indigo, estas noble ekzemplo, kiun nur malmultaj kapablas imiti, kiun oni povas nur spirhalte admiri. Nepriskribeblan laboron, konatan tutmonde, vi faris por la homaro, por ĝis bono, por ĝia komprenema kunvivo pere de Esperanto. Viaj originalaj verkoj, ĉeĥaj kaj slovakaj literaturaj juveloj kaj juveloj de alilandaj literaturoj en viaj perfektaj tradukoj dum longaj jardekoj estiĝis trezoro de esperantisto jen ĉiuj kontinentoj.

Kaj Vi? Ĉiam modesta, nobla, helpopreta dediĉas al ni ĉiujn siajn kapablojn kaj fortojn.

Okaze de Via vivjubileo permesu al mi, kara Miloš, ke mi ĉirkaŭbraku Vin kaj frate kisu Vin en la nomo de la tuta dankema esperantistaro, kiu deziras al Vi plenan sanon kaj viprosperon dum ankoraŭ longaj jardekoj...

Tutsindone via

-jelĉ-

Praha-ek-1957-49-03

BULTENO PRAHA 49 1957

- 03 -

Multaj legantoj skribas al ni. Iliaj leteroj dokumentas, ke niaj klopodoj ne estas vanaj. Ne eblas publikigi ĉiujn leterojn, kvankam fratecaj sentoj tion plene meritus. Kiel esperdonaj estas la leteroj de niaj legantoj el Sovetio, el Ĉinio, Vietnamio, el proksimaj popoldemokratioj. Same karaj estas la leteroj de la legantoj el ceteraj mondpartoj, kiuj pere de nia simpla Bulteno estas informataj pri la floranta movado en niaj landoj. Tiel skribas ekz. nia greka leganto S. Sakellaropoulos el Athine, nia afrika leganto Manuel de Oliveira e Silva el Nova Lisboa en Angolo, nia leganto el Alĝerio, el Turkujo, legantoj el Suda kaj Meza Amerikoj, el Aŭstralio kaj Novzelando. Preskaŭ ĉiuj tamen esperimas unu komunan deziron: ke baldaŭ ili legu niajn informojn presitaj Jes, tio estas ankaŭ nia firma volo kaj celo, kiu pli malpli frue efektiviĝos! Kaj vi, kiuj demandas kiel regali la alsendadon de nia Bulteno ne povante ĝin aboni, sciu, ke dankeme ni akceptos esperantan literaturon, se viaj ebleco kaj bontrovo la meriton pritaksos. Al ceteraj legantoj, kiuj ne povas nin helpi: la mondonacoj de niaj ĉeĥoslovakaj legantoj garantias nian komunan ĝojn havi vin en la tutmonda reto de la Bulteno-legantoj!

La redakcio.

DANKESPRIMO de s-ano H. F. van Denzen el Nederlando, kiu en sia februara letero i. a. skribas: „Mia vizito en via lando estos por mi neforgesebla! Pere de via Bulteno mi dankas al ĉiuj, kiuj agrabligis mian restadon, precipe al la klubanaro en Žďár nad Sázavou. El la malproksima Nederlando mi salutas vin ĉiujn kaj eble (se mi bone memoras la ĉeĥan esprimon): na shledanou!

Dekoj da salutkartoj atingis nin dum la libertempaj monatoj. Ni tre ŝatas kaj dankeme taksas tiun ĉi rememoron. Speciale ni dankas pro la salutoj el Renkontiĝo de esperantista junularo en Moskvo, el nunjara Esperantujo en Marsejlo...kaj el Stokholmo kun sinceraj vortoj de eksprezidanto de UEA Enfrid Malmgren, D-ro E. A. Bokarev kaj Inĝ. Gustav Nilsson.

Vuk Echtner: MI ESTIS EN MARSEJLO!

Jes, karaj samideanoj, mi havis la bonan ŝancon partopreni la nunjaran, la 42-an Universalan Kongreson de Esperanto sur la bordo de Mediteraneo. Kaj jen mi transdonas al vi salutojn de la maro, de la Kongreso, saluton de Ivo Lapenna presone komisiatan, salutojn de multaj, multaj amikoj viaj en eksterlando. Ili venadis al mi kun siaj notlibroj malfermitaj kaj demandadis-demandadis pri vi-kaj estis feliĉaj, se mi povis jesi, ke mi konas vin, kaj diri kelkajn vortojn pri vi. La rememoro pri la malmultaj kongrestagoj restos por longo, kaj jen mi estas por diri kelkajn vortojn pri ili.

Ne abundas loko en Bulteno por rakonti, kiamaniere mi kaj mia blinda amiko fine tamen sukcesis venki la konatajn malfavorajn kondiĉojn por la kongresvojaĝo. Fakto estas, ke ĝis la lasta momento estis nur pala espero-sed la ceteraj delegitoj jam pli frue perdis eĉ tiun.

Praha-ek-1957-49-04

BULTENO PRAHA 49 1957

- 04 -

Mi konstata sole, ke marde, la 30-an de julio je la 8-a matene mi ricevis pasportojn kaj vojaĝbiletojn por mia amiko kaj mi, kaj je la 10-a komencis la vojaĝo, unue per aŭtomobilo al la flughaveno de Praha-Ruzyň kaj je la tagmezo nia aeroplano nin portis jam trans la unua landlimo-direkto Zŭrich. En la poŝo estis por mi krom la menciitaj dokumentoj 17 mil francaj frankoj kaj letero de TKKE, kiu delegis min al la Universala Kongreso. La celo de nia flugo estis Paris, de la vojaĝo mem Lyon, kie ni devis partopreni la blindulan parton de la Kongreso, t. e. la 27-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj. Dum la mallonga halto en Zŭrich, ni „gustumis“ la unuan elspezon de francaj frankoj – por sendi poŝtkarton al niaj familioj; estis necese venki la altajn ciferojn de la frankprezoj-sperto, kiu nur konfirmis la antaŭan informon, ke la miloj en nia poŝo ne estas granda riĉaĵo; ĝi sufiĉos apenaŭ por la kvar aŭ kvin tagoj da restado en Lyon. Oni bonvolis lasi al nia konsidero kaj mastrum-arto, ĉu ni budĝetos la sumon por plua restado. Tio, kompreneble, estis forta limigo. La delegantaj instancoj ne kapablis kompreni, ke la kongreso mem daŭros pli longe, kaj ke ĝia fako, la Blindulkongreso eĉ aldonos pluan daŭron...

Jen Parizo, doganaferoj, aŭtobuso al Esplanade des Invalides kun la aeroficejo, poste tuj kaj tre rapide almetro kondukanta al la stacidomo por Lyon. Nokte post la deka-Lyon. „Reĝa“ aŭtomobilo/t.e. de la samideana familio Roy/ venigas nin al nia hotelo d'Institute. La strato estas „Marsejla“ - supozeble por kutimigi nin iom post iom al la atmosfero baldaŭ spirota...

Malgraŭ ni malfruis la tutan malferman kunsidon, ni ĝuis mirinde belan kaj interesegan kongreslaboron en Lyon. Pri ĝi ni diros al la vidantaj samideanoj nur tion, ke la ĉi tiea kongreslaboro distingiĝis de tiu en Marsejlo tre klare per tio, ke apenaŭ aŭdiĝis la vorto Esperanto. Oni ne parolis Esperante pri Esperanto, sed pri gravaj, praktikaj, fakaj aferoj. Tiel pasis merkredo, ĵaŭdo kaj vendredo. Vendreda Vespero. Alvenas granda karavano de kongresanoj el la nordo: svedoj, norvegoj, danoj... „Saluton, samideanoj!“ - „Ho, de kie? - Ĉeĥoslovakio? - Ĉu vi do konas samideanon Vitek?“ Preskaŭ kontrole sonis la demando. Mi timas, ke oni ne estus kredinta mian landanecon, se mi malbonŝance ne estus koninta tiun nomon! - Ja ĉeĥoslovakano fariĝis malofta birdo dum kongresoj, kaj la kono de Vitek estas por skandinavo bona legitimilo, kredu min.

Sabato, la deka matene. Forta atako de rezervitaj vagonoj en la stacidomo Lyon-Perrache. Kvarhora veturo – jen Mediteraneo, grize blua, blue griza, vasta, senlima al la firmamento: oni ne scias, kie estas la linio inter maro kaj ĉielo. Post apenaŭ horo Marsejlo, stacidomo Sankt-Karola. Ĉu neni en la Informejo? Atendu! Fine ni rajtas eliri el la granda stacidomo. Alta afiŝo inter du mastoj, bonveniga teksto verdlitera sur blanka tolo, kaj verdaj flagetoj sur tramoj konfirmas, ke ni estas en la ĉi-jara ĉefurbo de Esperantujo. Malgranda aŭtobuso veturigas nin al nia hotelo en rue Masagan; bone ni loĝas-kaj lavinte nin, neripozinte, ni rapidas al la Kongresejo. Ni reiras vojon, ĉar la Kongresejo troviĝas tutproksime al la stacidomo, en la haloj de Fakulto de Sciencoj. Kongres-

dokumentoj en du kovertoj; kongres-insigno; ĝin ni rapide fiksas sur la brsto, por doni al la Marsejlanoj okazon por koni nin kiel iliajn gastojn kaj por ricevi de ili la afablaĵojn, kion diktas al ili alvoko de la urbestro sur grandaj afiŝoj fiksitaj sur multaj lokoj tra la tuta urbo. La afiŝoj estas en du lingvoj: la franca kaj Esperanto. Ili flate imponis al ni.

Familio Gonin estas mirinda. Patro, patrino, filo organizis kaj movigis la tutan aranĝon en Lyon, kaj eĉ tie ĉi, en Marsejlo ili kapablas miraklojn. Kie estas la altaj prezoj? La aŭtobuseto alhotela, la mendo de ĉambroj-kaj nun la manĝoplano estas ili faro: ĉio estas ne tre kosta, la frankoj sufiĉos, ho, ni povus resti eĉ pli da tagoj, eble dum la tuta Kongreso, se ankaŭ nia pasporto tion permesus.

Do, rapide al vespermanĝo en la malalt-preza restoracio en rue de Sénac.

Ni renkontas konatajn kaj novajn kongresanojn en intima, malgranda loko, sed pli da ili, svarmo amanta, babilanta, babelanta nin ataka sen ĉiuj ejoj de la granda operejo ĉe la mara fino de la bulvarado Canebiere, preskaŭ sur la marborda kajo. Ĉi tie estas la areo de la Interkona Vespero kaj de la morgaŭa Malferma Kunsido.

Kion novan rakonti pri la Interkona Vespero? Kiu iam estis kongresano, sicas, kiel ĝi aspektas kaj komprenas, ke ne estas facile redoni ĝian atmosferon en limigita artikoleto. Mi diru nur, ke la Interkona Vespero estas tiu parto de la UK-oj, kio sin plej klare montras la Esperantista psikologio-kaj plej studinde. Mi plej ŝatas la Interkonajn Vesperojn-apud la pli solena Malferma Kunsido. –Kaj kiu ne esis kongresano ĝis nun, al tiu vane oni provus nur skizi. La Interkona Vespero, kun sia nervema serĉado de malnovaj geamikoj, kun la maltrankvila movado sur ŝtuparoj supren kaj malsupren, krédo de balkono aŭ loĝio al la teretaĝo, la postkuro post iu, kiun oni ĵus aŭ antaŭ minuto vidis tute certe sur la alia flanko de la domego. Ha, malnovaj konvoj Dolapĉiev, Canko Murgin; jen vidu, la glorusoj Auld, Waringhien, petu subskribon rapide, jam ili forturniĝas... Ĉu vi vidis s-aninon Noll? Jes, ŝi venis, freŝe, june vigla malgraŭ la aĝo; ne, Privat ne ĉeestas, li ne venos, alia Kongreso bezonas lin; ha, samideano Woodruff el Sud-Afriko, ĉu vi memoras? Antaŭ dek jaroj ni kune banis nin en rivero Aare dum la varmegaj tagoj de la UK en Bern. Jen la digna Carolfi-ĉiam la sama, bonvolu subskribon... Kaj poeto Vanselow- ho, ne vi ne estas maljuna! –Jam for, Interkona Vespero, mi devas iri plu, al la Malferma Kunsido morgaŭa-aŭ la Bultenaj paĝoj ne sufiĉos... Sed mi ankoraŭ menciu la belan promenon sur la marborda kajo, nokter, kun la multaj lumoj kaj la senĉesa persvadado de barkistoj idisto invitantaj al marpromeno perboata. Ne, ni ne iros, iu avertis nin, kaj ... mankas frankoj.

Kiam iras Marsejlanoj dormi? Ĉu eble la varmega vetero dumtage kaŭzas, ke ili eliras nur nokte sur la straton? Dumtage la Canebiere estis plena, sed kiam ni noktmeze iris al hotelo por ripozi, La Canebiere estis amanta abelujo. Ĝi estis plenplena de homoj. Ni renkontadis anojn de ĉiuj rasoj: tre elegante vestitaj negroj, fortmuskolaj araboj, gracilaj ĉinoj, hindinoj en ilia pentrinda vosto kaj bongusta hararanĝo miksiĝis inter la indiĝenoj, ĉe kiuj ni obselis ilian someran vestmanieron facilan kaj plaĉan. Sed io tamen malplaĉis al mi: kun gepatroj plejparte junaj, estis ankaŭ infanoj, etuloj evidente tre dormemaj, kiuj devus esti jam longe en la lito kaj ne sur La Canebiere. Same estis en la apudaj stratoj Belsunce, St. Ferreol, Garibaldi...

Dimanĉa mateno. Je la oka La Canebiere preskaŭ malplenas. La solidmaniera mezeŭropano, ripozinta, freŝa, marŝas por diri al la maro „Bonan matenon“ kaj rekompence ricevas la pitoreskon de ĝia aspekto. Ĝin prezentas la enurba golfo borderata de la Havena Kajo, de la Kajo de Belgoj kaj Kajo Rive-Neuve. Barkoj pleniĝas per ekskursantoj. Boatoj de fiŝistoj nun estas vendejoj de fiŝoj ĉiuspecaj, kraboj kaj aliaj abomenaj maranimaloj-kaj virinetoj venas, netas, foriras. La bildon vi ne nur gapas, sed ankaŭ flaras...

Jam hieraŭ la Konstanta Kongresa Sekretario, s-ano Gian Carlo Fighiera trastudis leteron de TKKE kaj notis mian oficialan delegon. Laŭ lia instruo, obeeme mi atendas kun aliaj delegitoj en ĉambro antaŭ la scenejo en la Operdomo.

ILO DE PACO

Ant. Chrápavý

Etaj miaj vortoj, frazoj

Sonas kiel sonorilo.

Pie sur iliaj bazoj

Ek de nun eduku filo,

Riĉon de la lingvo bela

Arte uzi nur por paco,

Ne por vorto sole ŝela!
Tintu korn' sen ĉia laco!
Ombrojn for de bril' verdstela!

Inter kamaradoj, fratoj
Lingvo nia verdkolora
Ordon gardu, eĉ en ŝtatoj
Duobligu, lingvo kora,
Esperanta fratajn sentojn,
Por ke ĉiuj reciproke
Amu sin, ne al si dentojn,
Cerbojn elbatadu moke!
Oni voku pacajn ventojn!

Praha-ek-1957-49-06

BULTENO PRAHA 49 1957

- 06 -

Sur la scenejo, en kvar vicoj sidas la oficialuloj. En la unua vico la organizantoj de la UK, t. e. la gvidantoj de UEA, la LKK kaj la reprezentantino de UNESKO; en la dua vico sidas reprezentantoj de registaroj; la aliajn du vicojn plenigis reprezentantoj de landaj E-organizoj. En la fono de la scenejo dignas impone la grandmezura kongresflago kun la nomŝildoj de kongresurboj: „Bern 1947“, „Malmö 1948“, „Bournemouth 1949“... Mi antaŭviziis sur la flago lokon por ŝildo kun la nomo „Bratislava“, sed la jarnombro restis iom nebula ankoraŭ...

Mia vico por saluti estis inter la „asociuj ne aliĝintaj al UEA“... posteno iom povra, ĉu? Post multaj jaroj aŭdiĝis saluto de ĉeĥoslovakaj Esperantistoj! En via nomo, karaj legantoj, mi certigis la mondforumon Esperantistan, ke ni eĉ ne po runu momento forlasis la tranĉeojn de nia poresperanta, porpaca batalo. En malfacilaj, malfavoraj kondiĉoj elproviĝis nia fideleco kaj firmeco. La Esperantomondo povas por ĉiam kalkuli kun nia batal-kamaradeco. – Mi estas certa, ke mi ne vante proklamis tion; kion vi opinias? – Ŝajnis al mi, ke la ĉeĥoslovaka saluto ricevis rimarkinde pli longan, pli flatan aplaŭdon, kaj cetere dum la kongreso ofte vidiĝis aparta intereso por la ĉeĥoslovaka delegito. Kaŭzis tion ne nur la multjara foresto de ĉs.samideanoj, sed efikis preskaŭ emocie certa parto en la festa kongresparolado de D-ro Ivo Lapenna, kiu emfazis, ke estas en la mondo jam nur tri landoj, en kiuj la Esperantistoj malfacile laboras sen subteno aŭ helpo de oficialaj rondoj; tiuj landoj estas Ĉeĥoslovakio, Orient-Germanujo kaj Portugalujo... Ĉiuj kongresanoj, kiuj parolis kun mi, bone Memfis tiujn vortojn kaj montris multan kunsenton kun ni en nia malfacilega situacio. La plej grandan komprenon montris D-ro Ivo Lapenna. Malgraŭ la multega ŝarĝo, kiun la kongreso metis sur liajn ŝultrojn, li trovis en sia laborplano tamen unu tutan horon kaj eble pli, por diskuti kun la ĉs. delegito pri la ĉs. movado kaj pri la propono de la E.-Klubo Praha koncerne eldonon de „Panglotta“ de Komenský. Ne estis nur mi, karaj ĉs. legantoj, kiun D-ro Ivo Lapenna en tre ĉarma maniero invitis al privata tagmanĝo; la honoris rilatis **vin ĉiujn**.

Tiu ĉi, por mi tiom multisignifa kunesto kun D-ro Lapenna okazis lunde. Necesas mencii, por esti almenaŭ iom akurata, ke hieraŭ, post la malferma soleno, ankoraŭ okazis fotografko de la kongresanoj. Ĝin oni organizis sur la vasta ŝtuparo gvidanta el bulvardo Garibaldi al la Sankt-Karola stacidomo. Por veni tien, fluis la amaso da kongresanoj trans la Canebiere kaj aliaj stratoj al la fotografejo. Ĉu vi povas imagi la inundon kaŭzitan? Malaperis de tiu multlingva, aŭ ĉiulingva urboparto ĉiuj aliaj idiomoj, kaj nur unusola aŭdiĝis en tiu horo tra la kvartalo. Oni parolis pri tiu rimarkinda momento publike. – Kaj dimanĉvespere okazis malfermo de la Somera Universitato. Parolis D-ro Lapenna pri la Suvereneco de ŝtatoj. La opaj prelegoj kaj kunvenoj okazi sen prelegejoj de la Fakulto de Sciencoj. La ejoj estis signitaj, por pli bona orientiĝo de la kongresanoj, per nomoj. Oni uzis la nomojn „Zamenhof“, „Kabe“, „Grabowski“ ktp. La Inaŭguro kaj unua prelego de la Somera

Universitato okazi sen ejo „Zamenhof“. En la sama ejo okazis la dua prelego lunde je la naŭa, kaj je la 10-a kunsidis tie la Unua Ĝenerala Kunveno de UEA. – London matene mi vizitis krome la Duan Internacian Infanan Kongreseton. – Bedaŭrinde la spaco mankas por rakonti. Precipe la temo „Kongreseto“ estas trudeme alloga. Mi diru do nur, ke ĝia ideo estas tre simpatia kaj ankaŭ tre sukcesa. En Marsejlo kunvenigis la „Kongreseto“ 16 infanojn el kvar landoj. Estis tre forta impresoj aŭdi ilian fluan interparoladon en Esperanto. Mia plejjuna kongresamiko jam en Lyon estis Hervé Gonin, dekjara vigla knabo-kiun mi jam menciis kiel ege hrtan kunorganizinton de la aranĝoj en Lyon. – La „Kongreseto“ komisiis min, saluti la ĉeĥoslovakajn infanojn, kiuj parolas Esperanton. Ĉi-voje mi transdonas la saluton!

Por longe restos mia dankosento por la unika okazo, ke mi dum mia mallonga kongresvizito povis renkonti tiom multajn bonajn amikojn, paroli kun ili, diskuti kun ili pri mia lando, pri niaj zorgoj kaj ojoj, pri nia laboro. Ja venis por renkonti min kongresamikoj de Bern 1947; automobile ili alveturis el Okcidenta Germanujo kaj Svislando, perso kaj mikino de Ukrajina deveno; bahaaj familioj gastigis min en Lyon kaj Marsejlo; kelkajn tre agrablajn horojn mi pasigis en armena familio, kun negra kaj egipta gesamideanoj. Mire multajn okazojn prezentas tia kongresvojaĝo...

Praha-ek-1957-49-07

BULTENO PRAHA 49 1957

- 07 -

Alproksimiĝis la adiaŭo. Mia pasporto ordonis. Ne eblas plilongigi ĝian validon. Ankoraŭ je la 18-a horo mi parolis pri Komenský en la fakkunveno de instruistoj – sed jam je la 20-a mi sidis en vagonaro, kune kun mia blinda amiko, por revojaĝi al Parizo. De tie per „Air France“ al Zúrich-Praha. Lasta manpremo kun renkontatoj verdstelumitaj, lasta sopka rigardo al la gastama urbo. Sur la placo antaŭ la Sankt-Karola stacidomo ni staris kaj vidis ĝin antaŭ ni, kun la brakendanta figuro de la Di-Patrinino sur la fora horizonto. Tramoj preterulas, ĝis sabato restos ilia verdstela ornamo...

Nur tri tagoj mi kongresis-feliĉe, kara redaktoro, por vi, ĉar alimaniere via Bulteno dikiĝus kreve, pro mia babilama raporto-sed mi volus tamen ankoraŭ diri multon multon belan-eĉ nur pri tri kongrestagoj.

LA UNIVERSALA KONGRESO 1958 EN MAINZ.

La ĉef-urbestro de la urbo Mainz ĉe rivero Rejno, samideano Franz Stein invitis la Kongreson de la jaro 1958 de la 2-a – 9-a de aŭgusto. – Dum Jarkunveno de la Germ.Esperantistoj (15-17 de junio 1957) s-ano Stein faris paroladon pri siaj jam nun ellaboritaj planoj koncerne la aranĝoj de la Kongreso. Plejparte la kunsidoj okazos en la Unversitato, kaj la festaranĝoj en la malnova Kastelo apud la rivero. Mainz estis detruita dum la milito de 85%, baldaŭ festos sian 2000jara ekziston kiel iama romana fortikaĵo Moguntia-ĝia situacio estas belega, je la enfluo de la rivero Main al la Rejno. Kaj ĝia proksimeco al la malnova Goethe-urbo Frankfurt/Main unuflanke kaj de Wiesbaden, Bonn kaj Kolonjo aliflanke certigas multnombrajn viziton de la Kongreso. Jam pli ol 150 urbaj oficistoj kaj policistoj lernas diligente Esperanton. – S-ano Stein deklaris, ke la Kongreso nepre devus havi gravan signifon por finfine konvici la germanajn aŭtoritatojn pri la graveco de mondlingvo kaj pro ties enkonduko en lernejojn.

Raportas nestoro de germ.esperantistoj
83-jara nia leganto ĉ. Barthol.

Eugeniusz Matkowski:
Mi kisas...

En songoj arĝentaj dum nokto venantaj,

En miaj miraĝoj spiritaj,
Mi kisas plorante la ombrojn plej sanktajn
Do miaj gepatroj perditaj.

En sonĝoj vidataj dum dormo enlita,
Kreskantaj en miaj okuloj,
Mi kisas fantomon de l' vivo rompita,
Rampanta en kot' kaj nebuloj.

Sur vojo plenplena de rokoj pik-pintaj,
En nokta tombeja malvarmo,
Mi kisas la reston de l' revoj mortintaj
Kaj ies postsignojn kun larmoj.

- - -

Miloslav Jíra: MI ESTIS EN MOSKVO!
(Esperanto-renkontiĝo la 9-10-an de aŭg.1957).

Renkontiĝo de Esperanton parolanta junularo okazi sen centra ŝakista klubo, Gogolevskij bulvar 14. Jam antaŭ la renkontiĝo kunvenis esp-istoj kelkfoje por reciproke konatiĝi-en la parko de M. Gorkij. Ĉeestis pli ol 40 esp-istoj kaj la ŝipekskurson sur la kanalo Moskva-Volga dimanĉe la 4-an de aŭg. Partoprenis 55 esp.gekamaradoj. Krom tio kunvenis sovjetaj, bulgaraj, hungaraj, ĉeĥoslovakaj, francaj kaj germanaj esperantistoj por pridiskuti la diversajn projektor de rezolucio, kiu estu akceptebla por ĉiuj. La komitato krom la bulgara propono havis tiun de germanaj kaj tiun de francaj esperantistoj. La prepara laborgrupo komisiis k-dojn Grigorjev, Nikolov, francajn kaj germanajn amikojn prepari definitivan tekston. Ili bonsukcesis ĝin prepari.

Esperantista festivala komitato preparis kaj dissendis al ĉiuj esperantistoj presitan invitilon en kolora koverto kaj kun amonita Himno de l' demokrata junularo.

La renkontiĝo malfermis k-do Serĝejev, bonvenigis ĉiujn ĉeestantojn kaj akcentis, ke por ni ĉiuj estas Esperanto bona ilo por firmigi la pacon!

Praha-ek-1957-49-08

BULTENO PRAHA 49 1957

- 08 -

En la estragon estis unuanime elektitaj: Jang Jungsen (Ĉinio), s-ano Petri (Maroko), V. Grigorjev (Sovetio), Serĝejev (Sovetio), Janoschka (Germanio), Ciliga (Francujo), Nikolov (Bulgario) kaj Ferenczi (Hungario). Ni domaĝe ne sukcesis, ke en prezidantaro eksidu reprezentantoj de ĉiuj kvin kontinentoj, ĉar samideano el Brazilo venis iom malfrue kaj s-ano el Aŭstralio ne ĉeestis.

Al la renkontiĝo venis multaj salutleteroj kaj telegramoj, inter alie ankaŭ pluraj el Ĉeĥoslovakio.

Ĉefan paroladon „rolo de Esperanto en proksimigo de popoloj kaj en lukto por paco“ prezentis k-do Nikolo Nikolov, reprezentanto de bulgara junularo. Li akcentis la signifon kaj la ĝisnunajn rezultojn kaj sukcesojn de la Internacia Lingvo (Esperanto) en la mondo-en lerneroj, konferencoj, parolas pri la subskriba kampanjo al UNO, atentigas, ke lernado de Esperanto ne devas esti memcela, priparolas diversajn manierojn de esp.agado, ekz.letervesperoj, kolektiva kaj individua korespondado, someraj kursoj, infana korespondado kaj mencias s-anojn en Germana Demokrata Respubliko, Ĉeĥoslovakio, Bulgarujo, Japanujo, Vietnamio, Hungarujo kaj aliaj landoj, kiuj tiurilate tre bone sukcesis. Li raportis tre favore pri la sukcesoj de Ĉeĥoslovakaj junaj esperantistoj kaj iliaj someraj tendaroj, akcentis, ke certe neŭtralaj esperantistaj organizoj ne perdus sian neŭtralecon, se

ili en estonto pli bone kunlaborus kun la Tutmonda federacio de demokrata junularo, kun Ruĝa Kruco kaj aliaj organizoj-. En diskutaj paroloj

Jang Jungsen (Ĉinujo): novaj sukcesoj de la movado. Kursoj nun en 10 urboj, en Pekino 2 kursoj. Baldaŭ aperos nova gazeto. Li transdonis flagon kun packolombino.

Paul Ciliga (Francio): malutila agado de SAT malhelpas en bona laboro kaj konfuzigas honestajn esperantistojn, kiuj sopiras je interkompreno kun ĉiuj bonvolaj homoj. Li rekomendis rompi ĉiujn rilatojn kun SAT, ĉar en sia organo ĝi rifuzas publikigi informojn pri la agado de UEA kaj obstine pritraktas nur la problemojn de sia mallarĝa vidpunkto.

Nikolo Nikolov (Bulgario) atentigas, ke iam SAT estis progresema organizo, sed pro sia nuna kontraŭsovjeta pozicio kaj kalumniaj kampanjoj tute ne helpas en nuna porpaca batalo.

Jean Thomas (Francio) – francaj laboristaj esperantistoj akcentas, ke la batalo por paco estas afero de ĉiuj homoj, ne nur de komunistoj.

Jukiko Nakano (Japanujo) transdonis donacojn de japanaj studentoj-kontraŭmilitajn materialojn. Ŝia parolado estis unu el plej kortuŝaj. Japana registaro malpermesis al pluraj veni al Moskvo. Deziro firmigi la kontaktojn.

Doris Mücke (Germanujo), juna studentino parolas en la nomo de germana esp.organizo, kiu sendis sufiĉe grandan delegitaron, ĉar ĝi konsideras la Festivalon nepre grava okazaĵo por paco kaj Esperanto.

Imre Ferenczi (Hungarujo) raportas pri la sukcesoj kaj kresko de sialanda movado kaj transdonas al ĉiuj landaj reprezentantoj donacojn en la nomo de hungara Esp.Konsilantaro-vazojn kaj broŝurojn.

Vietnama kamarado, membro de armea ansamblo, parolis pri la sukcesoj kaj plena subteno de Esperanto en sia patrujo, akcentis speciale bonan kunlaboron kun la popoldemokratioj. Esperanto estas plej facila lingvo por vietnamanoj. Transdonitaj donacoj-vietnamaj lernolibroj de Esperanto.

Martinskaja: salutis ĉiujn en la nomo de lingvosciencia instituto, kies membroj nun partoprenas sciencon konferencon en Norvegujo.

Hispana delegito: raportas pri la laboro de katalunaj esp-istoj kaj esprimas la esperon, ke lia lando vivos en baldaŭa estonto en pli liberaj kondiĉoj.

Been v. Moorst (Nederlando) salutas en la nomo de TEJO kaj donacis al moskvaj esperantistoj librojn.

Giorgio Marinucci (Italujo): financaj malfacilaĵoj malebligis partoprenon de pli multaj junaj esperantistoj.

Etienne Quaglia (Svisujo): parolis tre bone pri la malfacilaĵoj lingvaj dum kelkaj internaciaj konferencoj fakaj, kiujn li ĉeestis.

Janoschka (Germanujo): lingvaj malfacilaĵoj en historia evoluo-ĉe internacia konferenco en 1640 en Múnster nur latina lingvo, en 1815 nur franca ligvo, en San Francisko en jaro 1945 jam 5 lingvoj kaj en UNESKO-konferenco jam estis uzraj 8 oficiale tradukeblaj lingvoj. Esperanto kaj bonaj interpretistoj perfekte solvas la mondproblemon.

Praha-ek-1957-49-09

BULTENO PRAHA 49 1957

- 09-

Paul Ciliga (Francujo): ni ne povas esti kontentaj, ke Esperanto estas uzata nur en unu festivala renkontiĝo inter la grupo de kelkdekoj da homoj. Ni devas en estontaj festivalaranĝoj atingi, ke oni uzu Esperanton en diversaj fakaj kunvenoj kaj ke ĝin lernu multaj gejunuloj por tiu celo. Malkontento pri envicigo de renkonto de esperantistoj en saman grupon de fakaj interesoj kiel fiŝkaptistoj, filatelistoj k. s. –

- Responde klarigo: ĝis nun ni ne havis la okazon montri al pli vasta publiko la utilecon kaj facilecon de nia lingvo. Tian ne estus ĝuste tuj postuli grandajn avantaĝojn kaj rapidan komprenon de oficialaj instancoj. Ĉi ĉio dependas de nia laboro kaj persisto.

Miroslav Jíra (Ĉeĥoslovakio): en la nomo de ĉs.esperantistoj salutas la ĉeestantajn delegitojn (aplaŭdo). Koncize li parolas pri ĝisnunaj spertoj kaj longaj tradicioj de la Movado de ĈSR, speciale pri iniciatema laboro de kelkaj junularaj grupoj, kiuj organizas somerajn tendarajn kursojn. Ankaŭ pri la ŝancoj je revivigo de nia movado, pri la eldonprogramo de lernolibro, vortaroj, bildkartoj ktp. Ni esperas renkonti en venontaj jaroj pli multajn esperantistojn el aliaj landoj. Estas unu grava konkludo – junaj esperantistoj devas disponigi ĉiujn siajn fortojn kaj sciojn de lingvo por servi al reciproka proksimigo de popoloj, al la paco kaj helpi ligi tiajn kontaktojn inter junularo, kiu ne scipovas alian lingvon.

Paul Ciliga: rekomando kolekti ekzemplojn de lingvaj malfacilaĵoj dum internaciaj renkontiĝoj kaj speciale ekzemplojn de neperfekto de ĝisnuna traduksistemo kaj disponigi ilin por argumenti dum ĝustaj kaj taŭgaj okazoj.

Imre Ferenczy (Hungarujo): en pli longa parolado rekomendas por plivigliĝo de la movado inter junularo organizi pli ofte regionajn kunvenojn kun interesa programo. Ili bone sukcesas kun t.n. „vivanta ĵurnalo“, en kiu ĝejnuloj rakontas novaĵojn pri sporto, kulturo. Grave estas, ke oni uzu ankaŭ murgazeton, almenaŭ parte en nacia lingvo. Li akcentas, ke ni bezonas internacian gazeton de esperantista junularo. Ne sufiĉas nu runu paĝo en organo de UEA anstataŭ malaperinta „Juna vivo“. Ni ankoraŭ ne povas bendi, ke baldaŭ oni eldonos esperanta eldonon de organo de tutmonda federacio de demokrata junularo „Junularo de la mondo“. Estus bone preparoli tiun ĉi problemon. Unu ŝanco estas en daŭra eldonado de la bulgara „Esperanto Festivalo“, sed ĝi postulas tre da laboro kaj elspezoj.

Dana delegito-representanto de UEA: transdonis salutojn de UEA, donacis afiŝojn de Kopenhaga kongreso kaj gramofondiskon kun prelego de Ivo Lapenna pri kultura valoro de Esperanto. Li ĝoje konstatis kreskon de la movado en Sovetio. Krom tio salutis la renkontiĝon esperantistoj: Ceca Stamonova (Bulgario), Kari Kokkin (Norvegujo), Marian Krszysiński el Pollando, Petri el Maroko, Gruškov el SSSR-Rostov, Charreuil (Francujo) kaj samideano el Svedujo.

Telegramoj senditaj al UK en Marsejlo kaj radio Sofia. La alvoko al esperantistoj en la mondo poste unuanime akceptita. La renkontiĝon partoprenis oficialaj reprezentantoj el 22 landoj, krom kelkaj, kiuj ne estis oficiale registritaj.

Vendrede posttagmeze estis malfermita esperantista ekspozicio en apuda salono. Malfermis kaj akompanis ĝin k-do Serĝejev el Moskvo. Ĝi enhavis multajn ekzemplerojn el literaturo de diversaj landoj, inter ili la plej novajn kontraŭmilitajn verkojn el Japanujo, multajn lernolibrojn kaj vortarojn kaj grandan amason da diversaj sovetaj gazetoj kaj ĵurnaloj el preskaŭ ĉiuj sovetaj respublikoj, en kiuj estis publikigitaj en lastaj du jaroj artikoloj pri Esperanto. Matene vizitis la kunvenejon laborantoj de moskva televid- kaj filmĵurnalo kaj pretigis kelkajn scenojn: juna universitata studentino-esperantistino interparolas kun diverslandaj esperantistoj (el Brazilo, Japanujo, Ĉinio, Hispanujo, ktp.) En la festivala gazeto de la 10-a de aŭgusto aperis konciza informo pri unusola remonto dum la festivalo, ĉe kiu estis superflujaj interpretistoj. Prezentataj estis ankaŭ hungara filmo pri la vivo de pioniroj kaj japana el Hiroŝima. Post la fino de la renkontiĝo okazis amuzkoncerto kun danco.

D O L O R O

Kio estas apreta timo,
se sur sterkon gutetas punca sango
dum oni fortendas, sed ne el vivo;

kio estas ĝemhen´ virĉevala,
se sur ingven´ varmego kuras
kaj cigano kun ring´ en orelo,
teruran vundon per ungvento ŝmiras,

komparita al pinĉ´ de l´ azuro, etera nedo,
se la Tero post eksplodo

dolorego ekkrios, en argila kolon´ pilastro,

kvazaŭ per etendita mano
iu aĉulo, kun altenŝovita maniko,
la Ĉielon mem, kia honto,
kastrus.

(post novaj eksplodoj de atomaj kaj hidrogenaj bomboj).

El ĉeĥa esperantigis kata kano.

Praha-ek-1957-49-10

BULTENO PRAHA 49 1957

- 10 -

KaJu: MI ESTIS EN DOKSY !!!

(Ĉerpita el Esperanto en Slovakio, n-ro 9.)

Doksy ĉi-jare bonvenigis nin iom malgaje, sub nubokovrita griza ĉielo. Malgraŭ tio, ke ĉiutage pluvis, nenio mankis al ni. La gaja verda societo bone amuzis sin kaj bonfartis. Dum pluvaj tagoj ni perfektigadis en la lingvoscio hejme kaj unu tutan tagon en la klasoj – krom la lernado ĉiutaga.

Kun granda entuziasmo kaj espero ni komencis la seriozan lernadon. Ni ĉiuj, ĉu komencantoj aŭ progresintoj, sentis, ke ĉi-jare ni devas pli firme paŝi sur la vojo al perfektiv. Tion ni ankaŭ faris sciante, ke eĉ tiel ni helpas fortigi nian tutŝtatan agadon kaj atingi la ĉefan celon de la movado.

Se ni komparas kaj valortaksas la ĉi-jaran „doksadon“, ni devas diri, ke ĝi estis pli altnivela ol tiu pasintajara. Eble ankaŭ tial, ĉar pasintjare ni ne havis tiel bone organizitan instruadon kaj ankaŭ eble tial, ke ĉi-jare partoprenis pli grandnombre la junularo. La ĉiutaga programo – krom la instruado – estis komplete plenigita de enhavoriĉaj kontribuajtoj de niaj esperantistoj. Profesiaj artistoj kaj simplaj bonkeraj homoj amuziĝis nin. Eĉ unu momento ne estis pasivita sen utilo. Ĉiuvespere ni komune amuzis nin kaj kantis. Simple sed grandioze ni ĝuis nian restadon en Doksy. Entute 180 gepartoprenantoj travois ankaŭ agrablan surprizon, kiam hazarde vizitis nin du eksterlandanoj, altlernejaj gestudentoj el Beograd. S-ano Mile Radeŝević, estonta profesoro de lingvoj, preparis por nia kolegianaro multajn neforgeseblajn momentojn per sia perfekta kaj interesa prelego. Lia mikino Olivera, kiu studis Esperanton nur dum kvar monatoj, ankaŭ je nia surprizo tre bele parolis. Iliaj sinceraj vortoj eligis ne unu larmon.

Ĉiutage la lasta (kvara) instruleciono estis komuna, kun prelego en ĉeĥa lingvo pri la tutmonda situacio de la Internacia Lingvo, pri ĝia literaturo kaj historio. La komencantoj jam ĉi tie povis ekkoni la riĉan kaj noblan vivon de d-ro L. L. Zamenhof. La 70-jaran jubileon de Esperanto ni festis per solena akademia vespero, per kiuj niaj artistoj preparis riĉegan programon.

Post dekkvartaga kunesto ni vole-nevole devis pensi pri disiro. Tre malvolonte ni svingis niajn manojn por adiaŭo, por revido... Kaj kvankam la tagoj avaris pri suno, ĉiu el ni prenis al sia hejmo sunon – la varman kaj brilan sunon de sincera frateco, de fideleco al nobla penso. La bonajn, ĉi tie kolektitajn semojn ni semos ĉiam kaj ĉie, kie estos bezono.

J. M.: MI ESTIS EN POPELNÁ !!!

(Tre konciza raporto pri nunjara SET-laŭ bezono de la redakcio).

14.-28.7. okazis en Popelná, distrikto Vimper, la VI-a junulara Somera Esperantista Tendaro, aranĝita de E-Rondeto ĉe ZK Jitex en Písek sub oferema organizado de ges-anoj Křivánek, kun partopreno de iom pli ol 100, plejparte junaj homoj kaj infanoj pli ol 12-jaraj, el la tuta ĈSR, el Jugoslavio kaj Svedlando. En la nombro estas 11 instruistoj (Echtner, Franc, Hořejší, Kořínková,

Lorková, Mařík, Novobilský, Novotný, Podhradská, Slivka, Valjan), la tendarestro Nymburský kaj kuir-personaro.

Antaŭtagmeze okazis 7 kursoj de Esperanto, ĝiaj literaturo kaj historio (2A, 3B, C, D), posttagmeze diversaj instruaj kaj amuzaj programoj, inter kiuj estis ankaŭ modesta, sed digna festo antaŭvespere de la 70-jara jubileo de Esperanto. Unutaga aŭtobusa ekskurso montris al la tendaranoj la interesaĵojn de la regiono. El 71 ekzamenitoj (inter ili 3 eksterlandanoj el 6 ĉeestintaj) 35 sukcesis eminente, 31 tre bone, 5 bone. Oni notu, ke de la C-kaj D-kursoj oni postulas sciojn pri literaturo kaj historio multe pli vastajn ol ĉe la estinta ŝtata ekzameno pri Esp-o. La literaturo estis prelegata laŭ la ĵus aperinta lernolibro de V. Novobilský (vidu anoncon!)

Kunvenon de junularaj reprezentantoj partoprenis 36 personoj el 18 lokoj de ĈSR kaj 2 jugosl.gastoj.

La instruado en la naturo estis ĝenata de pluvoj kaj oni de rifuĝis en la ĉambrojn de la manĝejo. Neniu malsaniĝis kaj la veteraĉon oni heroece mokis per komika kanto „Pluvegis kaj akvo levis sin...”

Praha-ek-1957-49-11

BULTENO PRAHA 49 1957

- 11 -

-ili-: MI ESTIS EN DOKSY !!!

Třebíč aranĝis sian nunjaran Someran Esperanto-Tendaron en la ĉarmega romantika valo de la rivero Jihlava apud la vilgaĝo Koněšín de la 4-a ĝis la 17-a de aŭgusto. Nian SET-on partoprenis entute 21 gesamideanoj, kiuj baldaŭ interamikiĝis kaj faris unu Rondon Familian. Kvankam malgranda, la SET apud Koněšín tamen ne estis „nia“, sed internacia, ĉar partoprenis ĝin ŝatata gasto el Hungarujo, nome la reprezentanto de la Hungara Junularo s-ano Andor Laczko, kaj la malnova amiko de la Esperanto-Rondo en Třebíč s-ano Dieter Berndt el la Germana Demokrata Respubliko. Ambaŭ eksterlandaj s-anoj multe helpis al ni Esperante paroligi ankaŭ ekster la lecionoj almenaŭ la progresintajn frekventantojn.

La plej junaj frekventantojn en aĝo de 8 – 14 jaroj instruis en amuza kaj tre konvena maniero nia blinda s-ano Jiří Vychodil, la maturaĝajn komencantojn s-ano Th. Kilian kaj la progresintojn la sperta kaj bone konata s-ano V. Echtner. Antaŭtagmeze okazis 4 lecionoj po 45 minutoj, posttagmeze ni ludis, banis, fiŝkaptis, brigadis aŭ kolektis fungojn-boletojn, per kiuj nia bonega kuiristino s-ino Suchánková plivariigis la manĝoliston aŭ plibongustigis la supon. La vetero estis tre bela, nur la konstanta pluvo de l' antaŭlasta tago igis nin ĝuste kaj juste taksi la favoron de l' suno, kiu daŭre ridetis al nia familia tendareto. Sukcesis bona afero dank' al nia senlaca s-ano Jaris Habeš kaj al liaj helpantoj ges-anoj Čermák, Daňhelová, Kilian kaj al nia juna esperiga duo Přemek kaj Zdeněk Poláček.

For estas la somerkoloraj sapvezikoj, resits nur melankolikaj rememoroj pri belaj, sunvarmaj momentoj kaj la espero, ke ankaŭ la venonta jaro havos someron kun brilanta suno kaj samideana tendaro...

NI RECENZAS, KOMENTAS, LEGIS POR VI ...

ESPERANTO DENOVE SERVIS KIEL PERILO DE LA LITERATURO. La ĉina poeto kaj ĵurnalisto Li Laojon, pri kies tradukoj el la „Sileziaj kantoj“ de Petr Bezruč kaj el la „Muta barikado“ de Jan Drda helpe de Esperanto ni jam skribis, preparis novan verkon el la ĉeĥa literaturo por siaj samlandanoj: Li tradukis la polaron „Čínský úsměv“ („La ĉina rideto“) de la ĉeĥa poetino Marie Pujmanová; ĉe la laboro lin helpis sia s-ano Ota Ginz, kion li en la bibliografiaj datoj ankaŭ mencias. La aŭtorino skribis por la ĉinaj legantoj specialan antaŭparolon. La libro ĵus aperis kaj la unuaj ekzempleroj venis al

Praha. La verko estas tre belgusto aranĝita kaj estas ekipita por portreto de la poetino. Tiel Esperanto denove pruviĝis taŭga instrumento por internaciaj kulturilatoj, ankaŭ kiel traduklingvo.

Pu

--

„DOKTOR ZAMENHOF“, la ĉeĥlingva biografia 304-versa poemo de Jiří Kořínek estas havebla en ciklostilita eldono. Prezo de la kajereto inkl.afranko Kčs 4,--. Mendebla ĉe J. Kořínek, Brno 14, Merhautova 159.

--

SKIZO PRI LA ESPERANTA LITERATURO kompilita de Vlastimil Novobilský, rotaprinta preso, 76 paĝoj, bindita. Prezo Kčs 20,--. Jen aperis grava kaj salutinda verko, kiu nin gvidas iniciace tra la tuta Esperanta literaturo ekde ĝia komenco ĝis la lasta jaro kaj informas pri la plej gravaj niaj literaturistoj.

La ampleksa supervido donas biografiajn datojn de esperantaj verkistoj, aprezon de iliaj verkoj, kiujn ĝi komplete listas. Ĉe multaj niaj elstaraj verkistoj kaj poetoj ĝi havas montraĵojn el iliaj verkoj. Aldonita estas esenca ĉerpaĵo el la Parnasa Gvidlibro pri la Esperanta poetiko kaj vortareto de la plej gravaj poeziaj fakterminoj kaj neologismoj.

La verko estas farita konsciencie kaj presita kun minimum da prezeraroj. Ĝi estos tre grava kaj efika helpilo por ĉiu serioza esperantisto, ne malhavebla de ĉiu kursgvidanto kaj mi povas ĝin varme rekomendi. Ĝi estas mendebla ĉe Jaroslav Kuzník, Opava, Mendlova 21.

Jiří Kořínek

Ĝus aperis gramofona disko kun du komponaĵoj de s-ano Radim Kudla. La surdiskigon preparis „Fotofon“ en Ostrava. La unua komponaĵo estas serenado „Ho venu!“ (vortoj de J. Baghy), Esperante kantas R. Wolek, ano de la ŝtata teatro en Ostrava, pianakompanas prof. L. Schmezerová. Ankaŭ la duan kanton „Sequituo“ (vortoj R. Kudla, esp. traduko de J. Kořínek) interpretas la samaj artistoj. Provizora prezo estas 38 Kčs. Jup li multaj mendoj des pli malmultekosta disko! Mendu tuj ĉe s-ano R. Kudla, Štupartská 9, Praha 1.

Ĝis komenco de ĉi-jara septembro aperis pluaj tri numeroj de nova TEĴA-bulteno, bele aspektanta kaj bonege legebla, malgraŭ la fakto, ke ĝi estas nur multobligita. Tamen ŝanĝinda ŝajnas la titolkliŝo, enhavanta ne sole eraron „Asacio“, sed eĉ ne tute korekte adaptitan „U“, por anstataŭigi evidente mankantan literon „Ĵ“. – Oni raportas pri: ekaktiviĝo de TEĴA en Jugoslavio, agado de ĵurnalista sekcio en Bulgario, nova enkonduko de regulaj esperantaj disendoj en Radio Sofia, Esperantista somerrestadejo en Bulgario, renovigita interŝanĝo de artikoloj efektivigota helpe de TEĴA kaj Esperanta por nacilingvaj gazetoj. Ceteran enhavon reprezentas organizaj informoj kts. Domaĝe, ke el ekzistantaj 6 mondaj kaj preskaŭ 70 naciaj telegrafaj agentejoj nur unu, nome International News Service, estas preta uzi nian lingvon kaj eĉ proponas al ĉiulandaj ĵurnalistoj bone platan kunlaboron.

stk

Originala novelaro „Homoj kaj riveroj“ de Johan Hammond Rosbach aperinta en eldonejo KOKO, Randbølvej 4, Kopenhago F. 140 paĝoj, prezo 12 d.kr. – Kolorplena buketo de sortoj de junaĝo ĝis lastaj momentoj antaŭmortaj, same bunta elekto de priskribitaj medioj kaj roluloj, miksaĵo de humoraj kaj seriozegaj momentoj en homa vivo. – Eminentas niaopinie humanisme agorditaj rakontoj „Koloro“, „La rusa kanto“, „Bravulino“ kaj „Bildo rompiĝis“.

stk

La 18an de julio aperis en soveta „Litĕraturnaĵa gazeta“ artikolo de rusa s-ano prod.dro Bokarev. Respondante la demandon de unu leganto pri Esperanto, dro Bokarev kompilis multajn pruvojn de ĝia taŭgeco en sferoj kaj sciencaj kaj sociaj. Li mencias tradukojn de klasika rusa kaj soveta literaturo kaj tre utilajn servojn farataj pere de Esperanto. Kun sia tuta science graveco li malaprobas la pseŭdosciencan teorion, ke Esperanto estas danĝera kosmopolitka elpenaĵo. Tio ĉi estas grava ankaŭ precipe por Ĉeĥoslovakio, kie similaj asertantoj ne mankas ĝis nun. Finante sian artikolon, dro Bokarev diras: „Pri Esperanto oni povas havi diversajn opiniojn, sed ne ekzistas kialo rifuzi de ĝi proponitajn servojn.“

EMINENTA ROMANVERKO EN ESPERANTO. Nova eldono de „Faraono“ de B. Prus. La verkaro de pola verkisto Boleslaw Prus apartenas inter la fundamentajn ŝtonojn de la kultura riĉaĵo de l'pola nacio. Unu el tiuj verkoj, la „Faraono“, prezentas kolorplenan, ravan bildon pri la egipta pasinteco antaŭ pli el tri jarmiloj. La juna faraono Ramses XIII, regato de unu el tiam plej civilizitaj regnoj, estis

perceptema kaj kompatema Monako. Li komprenis la bezonojn de la egipta popolo, katenita de la pastra hierarĥio per superstiĉoj, nescio kaj perforto, kaj klopodis plifaciligi ĝian sorton. Sed Ramses mem vivis en kvazar kaptiteco de la altranga pastraro kaj staris dum jaroj sola kontraŭ tiu kasto.

Praha-ek-1957-49-13

BULTENO PRAHA 49 1957

- 13 -

La bonega rakontisto ravas la leganton tuj de la unua paĝo kaj tenas lian atenton ĝis la lasta momento. La verko estas skribita eksterordinare drameco kaj streĉe kaj donas la eblecon konatiĝi kun la historio de tiu terparto, kiu donis al la malnovepoka homaro altan kulturon. La trivoluman romanon de Prus la esperantistaj legantoj legos kun granda intereso. Ili ĝuos ne nur la enhavon, sed ankaŭ la lingvaĵon. La emitenta traduko estas ja farita de Dro . Bein (Kabe) kaj ĝi estas ĉefverko de simpla, klasika Esperanto.

La romano „Faraono“ en tri binditaj volumoj kostas Kčs 75, per poŝto Kčs 80. Mendojn akceptas Esperantista Klubo en Praha 1, Dlouhá 10.

J. M.

Belaspektan esp.kantareton, kompletigeblan per novaj kantoj, kiuj estas sinsekve eldonataj, mendu ĉe Marie Bartovská, n. p. Slezan, Místek, provizore sen pago. La prezo estas ĉ. 4,- Kčs, unuopaj enmeteblaj folioj po 0,60 Kčs.

ĈINAJ TRADUKOJ EL NIA LITERATURO. Ni sukcesis trovi en Ĉinio kelkajn ekzeplerojn de la longe disveditaj „Elektitaj ĉeĥaj noveloj“ (Neruda, Machar, Šrámek, Langer, Gregorová, Gregor-Tajovský, Jilemnický, Wolker), 68 pĝ, 12,5 x 17 cm kaj „Elektitaj ĉeĥaj poemoj“ (Čech, Sládek, Hurban-Vajanský, Neruda, Machar, Toman, Novomeský, Lukáč, Halas, Bezruč, Vrchlický, Jesenský, Wolker), 114 pĝ, 12,5 x 17 cm, tradukitaj en ĵinan lingvon de Kumi-Huan laŭ Ĉeĥoslovaka Antologi. Ni povos liveri ĉi tiujn maloftaĵojn al seriozaj interesuloj po Kčs 25 aŭ frankita. Vian mendon ni konfirmos per nia pagilo kun noto de pagota sumo. Detalojn pri tiuj ĉi unuaj ĉinaj tradukoj el lingvoj ĉeĥa kaj slovaka, kiujn ebligis Esperanto, serĉu sur paĝo 97/1951 de nia „Esperantista“.

O. G.

DONACANTO DE SENMORTECO, en kiu rakontas Miroslava Rektorisová pri savo de antikvaj dokumentoj kaj libroj, aperis kiel ĉefartikolo en la 33-a nro de la Scienca Revuo. La artikolon tradukis laŭ Literární noviny nia membro Ota Ginz, nun en Izraelo. Li atentigis pri ĝi fakulojn en Izraelo, kiuj petis Hebrej tradukon. Intereson vekis en Izraelo ankaŭ la artikolo de dro I. Lapenna „La maro en la internacia juro“, aperinta en la sama kajero.

O. G.

BEZRUČ EN ĈINIO. Kimaniere Esperanto igis konata nian grandan poeton Petr Bezruč en Ĉinio, ni lega sen nro 4/5 de Listy Památníku Petra Bezruče. La artikolo alportas multajn detalojn kaj ripete akcentas la gravan rolon, kiun ludas Esperanto en diskonigo de ĉeĥa literaturo.

O. G.

PANGLOTTIA de Jan Amos Komenský, la unua science fundamenta verko pri Lingvo internacia estas de antaŭ du jaroj prespretigita en latina originalo kaj ĉeĥlingva traduko kun speciala antaŭparolo de Komeniologo Josef Hendrich (21.2.1885-5.10.1950) kaj kun la skizo „Novae harmonicae linguae tentamen primum“ deponita ĉe Ĉeĥoslovaka scienca akademio en Praha. La prelegontoj, preparantaj solenan memorigon de Comenius, interesan enhavon trovos en artikolo publikigita en „Esperantista“ 1951, nro 11. Samtema artikolo aperos en 4-a nro de „Norda Prismo“ 1957 ricevebla ĉe administrejo en Stockholm, Barnhusgatan 8, Svedio, por la interesantoj en ĈSR ĉe EK Paha, Praha 1, Dlouhá 10.

VY

OPERA DIDACTICA OMNIA de Comenius, aperintaj antaŭ Tricent jaroj en Amsterdam, sed eĉ nun plene aktualaj, ĵus eliris foto-meĥanike represitaj: lukse ekipita, bandita verkaro trivoluma kostas Kčs 200,--. Al eksterlandaj samideanoj ĝian aĉeton kaj sezon povas prizorgi EK Praha.

HN

COMENIUS-EKSPOZICIO en Praha, Valdštejn-palaco (tramstacio Klárov) estas tre vizitinda. Ni esperas, ke la aranĝanto kompletigos ĝin per elmonro aŭ citaĵoj de „Panglottia“.

AL

NI SERĈAS LIBROJ: SKANDERBEG, heroo de Albanujo (Cuke Simoni) kaj LA TRAVIVAĴOJ de la BRAVA SOLDATO ŜVEJK DUM LA MONDMILITO (Jaroslav Hašek, tradukis J. Štadler). Posedantoj de tiuj libroj bonvolu sin anonci al J. Šustr, Dlouhá 10, Praha 1.

Praha-ek-1957-49-14

BULTENO PRAHA 49 1957

- 14 -

MONDA KONGRESO KONTRAŬ ATOMA KAJ NITROGENA BOMBOJ okazis en Tokio (Japanujo) en la tagoj 12-16a aŭgusto. Al la kongreso ni esprimis telegrafe siajn dezirojn de sukceso al ĝia paca laboro.
Ŝ.

Ĵus atingis nin la trista sciigo, ke mortis nia longjara membro Václav Pokorný el Praha en sia 53-a vivjaro. Samidenao escepte energia, scianta plurajn orientajn lingvojn, inter ili la japanan kaj jinan, malgraŭ sia grava plurlara malsano estis fervora esperantistino kaj plej serioze kontribuis al la movado. La esperantistaro perdas en li eminentan kunlaboranton. La lastan adiaŭon partoprenis la 10-an de septembro pluraj gesamidanoj, inter ili la prezidanto de EKP. La mortinto vivos en niaj memoroj!

PROPAGANDAJ POŝTKARTOJ. La ĉeĥoslovaka MEM-sekcio eldonis poŝtkarton, kiu trafe propagandas kontraŭ ĉiuj skeptikuloj kaj malamikoj de Esperanto. Teksto en Esperanta kaj ĉeĥa lingvo. Eldonita en aŭgusto 1957 en 10 000 ekz. Nigra preso, poŝtkartformato. 5 mil estis jam venditaj en daŭro de nuraj 14 tagoj. 50 pecoj inkl. poŝtafranko kostas nur 20 Kčs. Mendojn akceptas: k-do Rudolf Burda, Palackého nám. 6, Plzeň, ĈSR. Eksterlandaj interesuloj povas pagi per samvaloraj esp.libroj. 1 Kčs egalas 2 leterafrankojn.

L. P.

ANTAŬ KRISTNASKO 1948.
(al s-ano Kynčl)

La homoj kredas
en hazardojn. Ne mi.
Pleniĝis tempo
kaj mi devis veni...

Ĉu vorto „amo“
movis mian koron
aŭ tio eble,
ke vi vendas florojn?

Ho, certe belajn!

Ruĝajn! Bluajn! Blankajn!
Kaj oni kantis.
Kaj mi kantis ankaŭ.

Mi, lernantino
el la lasta benko,
nur devis veni.
Via estis venko!

Eli Urbanová

ESPERANTA PAROLADO PRI HISTORIO DE ĈEĤOSLOVAKIO okazi sen Sofia la 27-an de junio en Ĉeĥoslovaka kultura instituto. Paroladis nia amiko Nikola Ivanov. Post la parolado estis projekciataj kulturaj filmoj. Samideanon Nikola Ivanovni kore dankas kaj salutas.

ŝ.

NI PETAS la Esperanto-societojn kaj la geesperantistojn de ĉiuj landoj sendi al ni bildkartojn, fotografaĵojn kaj aliajn materialojn, kiuj prezentas naciajn kostumojn, popolajn kutimojn, morojn kaj festojn ĉu post naskiĝo, fianĉiĝo aŭ edziĝo, ĉu je la renkontiĝo de novjaro k. s. por la ekspozicio aranĝota la 15-an de oktobro 1957. Ni nepre respondos.

ESPERANTO-SOCIETO „VEKIĜO“,
Poŝtkesto 60, KOLAROVGRAD,
Bulgario

VOKAS VIN HRADEC KRÁLOVÉ, kie la loka Esp.Klubo aranĝas gravan ekspozicion „ESPERANTO 1887-1957“. Inaŭguro la 15-an de septembro en Adalbertinum. Pluraj ekspoziciaj fakoj kun abunda kaj rara materialo donas al vizitanto kompletan bildon pri la evoluo kaj nuna stato de la Internacia Lingvo. Ni varme rekomendas la viziton kaj imiton!

Pola-ĉeĥa renkontiĝo sur ĉeĥa plej alta monto Sněžka (1603 m) efektiviĝis dimanĉe la 21-an de julio. Aranĝis ĝin Esp. rondeto en Náchod. Partoprenis 40 personoj, kiuj gaje pasigis 10 horojn de bela tago.

EĈ JAPANOJ... Naci- kaj esperantlingva japana gazeto „La revuo orienta“ vikle interesiĝas ankaŭ pri eŭropaj esp.okazintaĵoj. En sia marta numero ĝi reprenis artikolon el nia Bulteno pri travivaĵoj de s-ano Frant. Patera en Sovetunio.

Praha-ek-1957-49-15

BULTENO PRAHA 49 1957

- 15 -

LA TRI MONDKONFERENCO KONTRAŬ UZO DE ATOM- KAJ HIDROGENBOMBOJ en Tokio, kiun salutis pluraj ĉs.esperantistaj rondetoj okaze de ĝia unaŭguro la 6-an de aŭgusto 1957, estiĝis grava mondmanifestaĵo por paca kunvivo de la homaro. Partoprenis ĝin 3 981 japanaj delegitoj kaj 97 delegitoj el 25 landoj de ĉiuj kontinentoj. Deklaracio estis sendita al ĉiuj registaro de la mondo.

INVITAS VIN VSETÍN. Esp. rondeto de ZK n. e. Závodu Říjnové revoluce en Vsetín aranĝas en tagoj 19.-23. de septembro 1957 seminarion kun prelegoj de s-anoj J. Kožený, Mil. Jíra, Vlad. Slaný, Frant. Omelka, Aleš Berka, Miloš Rudolf, Frant. Svačina kaj Ant. Satttek. Prelegoj estos ĉiutage de la 18-a horo en granda klubejo de la entreprena kluba domo. Sabate la 21-an por la partoprenantoj estos aranĝata amika vespero. Programon prezentas Valaĥa danc- kaj kantgrupo „Vsacan“, portanto de „Ordeno por emitenta laboro“. Komenco je la 20-a horo. Dimanĉe la 22-an je la 9-a horo estos konferenco de esp. aktivuloj el regionoj Ostrava, Olomouc kaj Gottwaldov kun partopreno de

representantoj slovakaj. Posttagmeze aŭtobusa ekskurso tra Valaĥio. Nepre vizitinda renkontiĝo kaj konferenco!

DONACO DE ESPERANTISTOJ EN OLOMOUC AL LA 42-a UK EN MARSEILLE. Esperantistojen Olomouc sendis al UK en Marseille magnetofonan bendon kun emitenta artprogramo: muzikigita premo de J. Baghy „Estas mi esperantisto“, „Infana balado“ de Jan Neruda, fragmento el soveta teatraĵo „Lulkanto de Naguo“ kaj marŝo „Junaj koroj“ el esp. teatraĵo de M. Boulton „Rivalaj fakoj“. La programo havas enkondukon kaj vortan kunligon. Artprezentis ĝis solistoj de Regiona opera teatro en Olomouc ges-anoj Bradová, Ŝulista, Hodková. Aŭtoro de muziko estas Stanislav Vrbík.

LA TRADICIAN RENKONTIĜON de ĉs. kaj polaj esperantistoj sur la limmonto Ĉantoria la 16-an de junio partoprenis preskaŭ 300 delegitoj, plejparte membroj de esper.rondetoj el Pollando.

La fremdlingva departemento de n. e. KNIHA, prodejna 2086, Praha II, Štěpánská 42 senkoste sendas al vi informojn pri novaperaĵoj en Esperanto. Ĝi stokas: Poeziaĵoj de J. Tuwim, La Faraono de B. Prus kaj ĉiuj ĝis nun eldonitaj n-roj de Pollando.

NOVA LERNOLIBRO DE ESPERANTO EN SOVETIO. Por la Mondfestivalo eldonis leningrada sekcio de la Socio por politikaj kaj sciencaj scioj gramatikon kaj vortaron por rusoj. Aŭtoro de la broĵuro estas N. D. Andrejev, kiu titolis ĝin „Международный вспомогательный язык esperanto. Kratkaja gramatika i slovarminimum“ (Internacia helplingvo Esperanto. Mallonga gramatiko kaj minimuma vortaro).

MONTO KUNĚTICKÁ HORA estiĝis dimanĉe la 25-an de aŭgusto loko de rendevuo de 40 reprezentantoj-esperantistoj el regionoj Pardubice, Hradec Králové kaj Liberec. Gastoj alveturis el Praha kaj Ostrava. Partopreno de norvega s-ano Olav Thormodsen internaciigis la kuneston. S-ano Mil. Jíra, esp. delegito ĉe moskva festivalo, informis pri la festivalo, pri uzo de esperanto en Moskvo kaj pri la laboro de soveta esperantistoj. S-ano Vuk Echtner raportis pri la 42-a UK en Marseille, kiun li partoprenis.

HEROLDO DE ESPERANTO aperigis jam sian 1250-an n-ron! Certe gratulinda jubileo. En n-ro 1251-a ni trovas poemon de Jiří Kořínek: Junia tago.

LA PROGRESANTO (Amsterdam) en sia 5-a n-ro alportas du artikolojn de nia membrano s-ino Julie Šupichová: Ekskursoj tra la vortaro, kaj Nomoj pri historio kaj movado.

Poemoj de Jiří Kořínek jam famiĝis, precipe eksterlande. Lia poemo „Promeno ĉe Mácha-lago“ trovis indan lokon en junia n-ro de „Espero Katolika“. La komisiono de la Belarta Konkurso de la 42-a UK laŭde menciis s-anon Jiří Kořínek pro lia originala poemo „Mi scias jam“.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO SENPAGA: se vi ĝin mendos kaj pagos por la jaro 1958, vi senpage ricevos la numerojn, kiuj en la nuna jaro ankoraŭ aperos. La jarkolekto 1956 kaj la numeroj jam aperintaj estas elĉerpitaj. Abonantoj, kiuj jam pagis kaj ne ricevis ĝis nun la aperintajn numerojn, ricevos la ankoraŭ aperontajn n-rojn senpage kaj ilia abonpago validos por la jaro 1958. Mendu kaj poŝtpagilon postulu de la peranto por ĈSR s-ano Th. Kilian, Třebíč.

Praha-ek-1957-49-16

BRNO VOKAS VIN: en la tagoj 6. – 19. de oktobro estas aranĝita en salono de la Artindustria muzeo, Husova 14 ekspozicio „70 JAROJ DE ESPERANTO“. Malfermo la 6-an de oktobro je la 10-a horo.

JUBIELA ESP. POŝTMARKO APERIS EN BULGARIO. Ĉeĥoslovakaj interesuloj povas ĝin samkiel la hungaran eldonon aĉeti ĉe Pofis, Příkopy, Praha 1.

SIMPLA VERO!

Homo, kiu vivmoderas,
kuraciston ne bezonas:
Kapo, ventro ne suferas,
nervozecon li ne konas!

Tial estas ĉefafero
por bonfarto de l' terano,
krom batalo por Libero,
la konservo de la Sano!

Al nia leganto W. Bickley el Norda Rodezio ni adresas sincerajn dankojn pro liaj instigaj vortoj rilate nian Bultenon. Li kaj lia edzino en kontento travivu sian kvinmonatan, certe merititan libertempon en Eŭropo. –

Al nia kunlaboranto Sanghano Njanasatta Thero el Bandarawela, Cejlono ni kore dankas pro la raporto pri la movado en Cejlono. Ni publikigos ĝin en nia proksima numero.-

Same ni dankas al nia leganto Domingos Garcia el FAIAL, Acora insularo pro grava kunlabora ago kaj alsendo de 6 fotografaĵoj, kiuj certe trovos sian represon kun akompana artikolo.

Pohlednice z letního esperantského tábora v Popelné, 2 druhy vždy po dvou obrázcích 6 x 9 cm a nápis „Somera esperantista tendaro Popelná-Šumava-ČSR 1957“, cena 1 Kčs za kus plus poštovné, zašle vám: Libor Křivánek, Zborovská 1332, Písek. Objednáte-li jen menší množství pohlednic, doporučujeme zaslat úhradu v papírových penězích nebo ve známkách v příloze objednávky.

„Co nového vyjde 1958“. Průzkumová verze edičního plánu na rok 1958, strana 65-66. Vydal velkoobchodní odbor n. p. Kniha, Praha 1957:

1208. Filip J., prof.: Česko-esperantský slovník. SPN, str. 550. Stoupající zájem o esperanto, nejen v našich zemích, ale v celém světě, vyžaduje si nové vydání Česko-esperantského slovníku. Slovník Jana Filipa obsahuje základní slovní fond a přihlíží též k socialistické terminologii. Vydání tohoto, již osvědčeného slovníku pomůže mnoha kroužkům esperantistů při osvětových besedách, závodních klubech, umožní práci překladatelům naší literatury do esperanta a poslouží tak k propagaci naší kultury v zahraničí a konečně umožní větší rozšíření tohoto jazyka, který se stává důležitým činitelem ve světovém mírovém hnutí. IV. Q. 10/m V 13,-

1209. Filip J., - K. Filip: Esperantsko-český slovník. SPN, str. 450. Obsahuje nejen běžnou lexikální zásobu, ale přihlíží též k botanickým, lékařským a jiným odborným výrazům. Umožňuje četbu esperantských děl celého světa. Je určen pro samouky a esperantské kroužky. IV. Q. 10/m 13,-

1221. Kilian T.: Cvičebnice esperanta. SPN, str. 134. Ústřední námět (život v rodině esperantisty J. Čecha) rozdělil autor do tematických celků, v nichž probírá jednotlivé mluvnické jevy. Kromě cvičení je tu mezinárodní čítanka a klíč ke kontrole překladů. Cvičebnice je určena pro samouky a esperantské kroužky. IV. Q. 6/m 9,-

Jen la sciigo por la vendejoj... ni varme rekomendas al ĉiuj intersuloj aliĝi sian mendon al sia plej proksima vendejo de Kniha. Same faru la rondetoj! Ŝtata pedagogia eldonejo devas konstati el niaj amasaj mendaliĝoj, ke la intereso pri jam tiel longe elĉerpitaj eldonotaj vortaroj kaj lernolibro estas tia, pri kiu certigis TKKE la eldonejon dum la preparuj traktadoj. Se necese, bonvolu dum viaj mendoj

ĉe via loka vendejo uzi la supre presitan ĉeĥan tekston. Dum la distribuo facile povus okazi, ke via loka vendejo ricevus nur kelkajn malmultajn ekzemplerojn kaj ne povus de kontentigi viajn postajn dezirojn ekster via antaŭa mendo.

TKKE

Praha-ek-1957-49-17

BULTENO PRAHA 49 1957

- 17 -

La 25-an de julio 1957

ĈINA ESPERANTO-LIGO:

Al landaj asocioj en

Sovetio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Rumanio, Vietnamio.

Estimataj gesamideanoj,

Kun granda bedaŭro ni devas vin informi, ke ni ne partoprenos la 42-an Universalan Kongreson en Marseille kvankam ni longe prepariĝis por nia partopreno. Ĉar la kongreso kontraŭe kun la lasta jaro sendis oficialan inviton al la forpelita Ĉjankajŝek-registaro en Taiwan (Formoso) kaj ignoras la rajton de nia popola registaro, kiu sola rajtas reprezenti la ĉinan popolon, tial ni devas sendi al ĝi proteston, sed ne delegitaron. Do, ĉinaj esperantitoj jam ne povos vin renkonti en Marseille aŭ en Praha, kion ni promesis al niaj ĉeĥoslovakaj gesamideanoj. Ĉi-kune ni sendas kopion de la protesto al vi, por ke vi komprenu la aferon. Fratan saluton Ĉina Esperanto-Ligo.

Kopio de la letero al 42-a UK por protesti la inviton al Ĉjankajŝek-reg.

Estimata s-ano, kun granda miro ni informiĝis, ke vi sendis oficialan inviton al la forpelita Ĉjankajŝek-registaro en Taiwan (Formoso) anstataŭ al nia Popola Registaro, la sola laŭleĝa registaro de nia lando, kiu rajtas reprezenti la 600-milionan ĉinan popolon. Ni konsideras, ke tia agado ne estas amika al niaj lando kaj popolo, kaj pri tio ni ne povas ne esprimi nian grandan bedaŭron kaj sendi al vi nian proteston.

Surbaze de la antaŭe dirita konsidero ni devas tute kontraŭvole forlasi nian planon sendi delegitaron al la 42-an Kongreso. Ĝi do okazos sen partopreno de la reprezentantoj de ĉina popolo – tio kompreneble ne faros bonon al la prestiĝo de nia movado, sed pri tio ni ja ne estas respondecaj.

Sinceran saluton Ĉina Esperanto-Ligo.

TKKE: ĉeĥoslovaka esperantistaro ege bedaŭras la eraron de LKK kaj plene aprobas la protestleteron de Ĉina Esperanto-Ligo, kion Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista en Ĉeĥoslovakio komuniké al Ĉina Esperanto-Ligo en sia letero la 3-an de aŭgusto 1957.

NOVAĴOJ EL GERMANA DEMOKRATA RESPUBLIKO: En Dresdeno la laboro por Esperanto vigliĝis; tie la polico havas ordonon ne ĝeni nin en nia porpaca laboro. Tamen presado kaj organizado ankoraŭ ne estas ebla. En Leipzig ni luktas ricevi la samrajtigon kun la dresdenaj. – En germanlingva gazeto „Presse der Sovjetunion“ (El la soveta preso) aperis dum antaŭlasta semajno artikolo pri la valoro de Esperanto de profesoro Bokarev. Ni eluzas ĉi artikolon por atingi, ke „Societo por german-soveta amikeco“ ne plu malhelpu nin.

25.8.1957

Helmut Moessner, Leipzig.

HUNGARUJO: ĉe la Landa Packonsilantaro de Hungarujo fondiĝis Esperanto-Komitato. Prezidanto estas gimn. direktoro Lajo Domokos, kiun la Packonsilantaro elektis inter sian membraron. Vicprezidanto P. Balkanyi, M. Kenesei kaj L. Márton. La Esp. Komitato celas rektan rilaton kun diverslandaj packomitatoj kaj pacbatalantoj per interŝanĝo de sperte, pacpresaĵoj, afiŝoj, bildoj ktp. Ĝi ankaŭ akcelos la pacmovadon ĉe la hungaraj esp. grupoj, helpos realit la programon de la

Pacmovado, de la Mondpaca Esperantista Movado, laŭeble ĉiujare eldoni numeron de PACO en Hungarujo kaj reprezentigi ĉe diversaj aranĝoj. Adreso: Budapeŝt VI., Népköztársaság utca 124.

Ĉiujn ceterajn kontribuantojn, speciale el Sovetunio, Vietnamio kaj Ĉeĥoslovakio ni atentigas, ke niaj ranzonitaj eblecoj ne permesas en tiu ĉi numero publikigi la nepre gravajn kaj publikendajn raportojn. Ni tre bedaŭras!

La redakcio de la Bulteno.

LASTMOMENTA SCIIGO: Ĉefa estraro de Asocio de Esperantisto jen Pollando kaj LKK en Gdańsk anoncas: XIV-a TOTPOLLANDA ESPERANTISTA KONGRESO okazos en Gdańsk en Aŭlo de Politekniko la 5-an kaj 6-an de oktobro 1957. Solena malfermo je la 10-a matene. Ĉeĥoslovaka esperantistaro deziras plenan sukceson!

Praha-ek-1957-49-18

BULTENO PRAHA 49 1957

- 18 -

DONACIOJ: A. Chrápavý, Ostrava 20; Josef Staňkuš, Orlová 20; V. Valach, Trnava 15; J. Bouček, Vel. Meziříčí 15; A. Böhm, Mikulovice 15; R. Kotrlová, Zděchov 12; B. Tyle, Bělá pod Bezdězem 15; J. Hadámek, Jakartovice 10; V. Kibalčíč, Tichý Potok 26; Kroužek Esperantistů Brno 25; J. Dittrich, Medlov u Židlochovic 15; L. Zavadil, Žďár n. Sáz. 15; L. Magera, Ostrava-Mar. Hory 25; J. Šereda, Brno 10; B. Jarka, Ostrava 12; A. Beisetzer, Prešov 20; Eli Urbanová, Praha 20; Old. Kail, Mezouň 11, 70; V. Voznica, Brankovice 20; F. Šilha, Luže-Košumberk, 30; K. Svoboda, Mlýny, 15;

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj. Sen ilia monhelpo ni ne povus plenumi nian gravan taskon!

La redakcio.

KORESPONDI DEZIRAS...

Interŝanĝi poŝtkartojn, gazetou, ĵurnalojn, lernolibrojn, amikan korespondadon proponas 7 korespondamikoj: USSR, Kujbiŝev 13, ul. Stolbovaja 148/2 s-anino Filomonovoj Tamare.

Kun juna esperantistino pri sporto, muziko, filmo, literaturo: JANOVSKI Rah, MOSINA K/Poznania, ul. Nietomnych 5, Pollando.

Kun ministr de karbminejoj pri ĉiuj temoj: Franco Denkovski, JANOW, Zielona 3 k. Katowice, Pollando. Kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj 26-jara: Ewald Szuliński, Giszowiec, str. Ogrodowa 30, k. Katowice, Pollando.

Pri ĉiuj temoj, certe respondos: Ignacy Gojakovski, Bocianovo 20/3, BYDGOSZCZ, Pollando.

Kun teknikisto/-ino aŭ inĝeniero/-ino, laboristo/-ino el Leninfabriko en Plzeň deziras interŝanĝi esperantaĵojn, bildkartojn kaj teknikajn sciaĵojn el mekaniko: Ĉan De-juan, Daŭŝenli No 5, urbo JAJ-JUANO, provinco Ŝansi, Ĉinio.

Kun ĉs. samideanoj: J. Kazlauskas, PANEVEZIS, Basanavičiaus 60 Liteva SSR.

18-jara junulo dez. koresp. kun ĉeĥa knabino 17-18 jara: V OVĈINNIKOV, ul. Komsomola 35, kv. 84 LENINGRAD K-9. USSR.

Pola filatelisto deziras koresp. kaj inteŝanĝi PM kĉl: Adolf Wyszatycki, GDAŃSK-WRZESZCZ, ul. Ceglana 12, 2, Pollando.

Kun esperantisto jel Jugoslavio, Germanujo aŭ Aŭstrujo pri medicino, literaturo, arto kaj klasika muziko: F-ino MUC Helena Kučerová (25-jara), CHODOV u Prahy 555, Ĉeĥoslovakio.

S-ano Jaroslav David (Hladké Životice) anoncas sian translokiĝon. Lia nova adreso estas PUSTĚJOV 240, kraj Ostrava, Ĉeĥoslovakio.

Leterojn kaj bildkartojn kĉl:

Fraŭlo Geraldo Simoons de Castro, rua 15 de Novembro No 240, BARBACENA, Minas Gerais, Brazilo.

Fraŭlo Antonio Gerreira de Oliveira, rua Tomas Gonzaga No 108, Barbacena, Minas Gerais, Brazilo.

S-ano Lincoln Antunes, rua Martinho Capos No 60, Barbacena, Minas Gerais, Brazilo.

Fraŭlo Waldemar Fernandez Meneghin, Avenida Rodrigo Silva No 100, Barbacena, Minas Gerais, Brazilo.

Fraŭlo Altaís Prenassi, rua Campolide 161, Barbacena, Minas Gerais, Brazilo.

F-ino Ana Maria Alves Cobra, rua Minas Gerais 85, Barbacena, M. G. – Brazilo.

F-ino Sonia Alves Cobra, rua Minas Gerais 85, Barbacena, M. G. – Brazilo.

F-ino Vera Maria Alves Cobra, rua Minas Gerais 85, Barbacena, M. G. – Brazilo.

S-ano José Cobra, rua Minas Gerais 85, Barbacena, M. G. – Brazilo.

BULTENO, informilo de Esperantista Klubo ĉe OB2 en Praha; aperas laŭbezone.

Respondeca redaktoro: Josef Víték, Jungmannova 24, Praha II., tel. 238323.

Prezidanto de la Klubo: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I., tel. 63464.

NIA LIBROSERVO:

Prezroj kun la afranko.

nova	Esperanto, učebnice a čít. Kilian	16,--	X
nova	UNUA LEGAĴO (Šupichová)	5,50	X
nova	Česko-esp.slovníček (Hromada)	2,20	X
nova	Esperantsko-český slovníček (Hromada)	2,50	
nova	DUA LEGOLIBRO (Brügemann)	3,50	X
nova	EL LA MITOLOGIE DE ANTIKVAJ POPOLOJ	3,50	X
nova	DU KOKCINELOJ (Gádonyi-Kalocsay)	2,50	X
nova	URBO SUB SIGNO DE FAJRO (Majerová)	6,--	X
nova	SEPTEMBRO (Geo Milev)	2,--	X
nova	KANTOJ POR LA PACO (Murgin)	2,--	X
nova	LA FANTASKOPO (Minkov)	2,50	X
nova	ELEKTITAJ RAKONTOJ (Elin Pelin)	3,70	X
nova	FAMILIO GERAK	2,50	X
nova	FARAONO (Boleslav Prus) 3 binditaj volumoj	80,--	X
nova	LEGOLIBRO (Ivan Sarafov)	19,--	X
dif.	POEMARO EL HUNGARLANDO (tr. Szilágyi)	6,--	
	BABILADOJ DE BONHUMORA ZAMENHOFANO	2,50	

Verketoj de L. Tolstoj (eldonaĵoj de Posrednik-Moskvo 1912):

	DIO – UNU POR ĈIUJ	1,--	X
	DIO VIDAS VERON	1,--	X
	KAŬKAZA MILITKAPTITO	2,--	X
	KIE ESTAS AMO, TIE ESTAS DIO	1,--	X
	PER KIO HOMOJ ESTAS VIVAJ	2,--	X
	SIEĜO DE SEBASTOPOLO	3,20	X
	UNU AMIKO EN ĈIUJ	1,--	X
	UNUA ŜTUPO	2,50	X
nova	POEZIAĴOJ (Julian Tuwim)	15,--	X
nova	NOVAJ BULGARAJ RAKONTOJ (Vazov)	3,--	X
nova	VAGABONDOJ	6,--	X
	NI DEVAS DIRI ĜIN	3,--	X
	BALADO PRI OKULOJ DEL' HEJTISTO	5,--	X
dif	LA FIANĈIĜO DE SOVAĜULINETO (Roksano)	1,50	
dif	GUSTAV VASA (Schmidt-Gotha)	5,--	
nova	KAATJE (Spaak) teatraĵo	15,--	
nova	KANTARETO	10,40	X
	ESP.KANTOKOLEKTO (Vink, Nederl.)	3,--	
	KRISTANA ESPERANTA KANTARETO	2,--	
	AMA VIVO EN LA NATURO (bölsche)	3,50	
	PAROLADO DUM LA ĜENEVA KONFERENCO		
	PRI SENARMIGO – 1932	1,--	
	DEVOJ DE LA HOMO (Mazini)	2,50	
	LA INFLUO DE VEGETARISMO (Nebenzahl)	1,--	

	EL LA BIBLIO (trad. L. L. Zamenhof)	2,--	
nova	KATOLIKA PREGARETO	3,--	X
nova	LA EVANGELIO LAŬ Sta MARKO (Londona)	2,--	
dif	MONDPACO KAJ ŜANTUNA DEMANDO (1928)	3,--	
	STATISTIKA RESUMETO (Brazilo 1938)	1,--	
	LA VERO PRI LA MILITO (unua) dokum.	2,--	
	POR NEDIVIDITA SUPERA SILEZIO	2,--	
dif	ESPERANTO, učebnice (Čejka-Krumpholc)	4,--	
dif	ESPERANTO, učebnice (Šupichová, III.vyd.)	3,--	
	PRAKTIKA KONVERSACIO (Pechoč)	5,--	
	ESPER. KONVERSACE V 1000 VĚTÁCH	4,50	

UPOZORŇUJEME, že jde téměř vesměs o výtisky antikvární!

Zkratky znamenají: nova – nový nebo také starý, ale nepoužitý. Dif. – poškozený. Písmeno „X“ za cenou znamená, že uvedenou věc můžete objednat při současném zaslání peněz, protože zásoba těchto věcí je dosti veliká. V ostatních případech vesměs napřed pošlete objednávku a vyčkejte až Vám dojde od nás složenka, což je důkazem, že objednané je připraveno k odeslání, které provedeme ihned po obdržení peněz.

Rádi Vám posloužíme! Nezasíláme však nic bez předchozího zaplacení. Také nezasíláme nic na dobírku! Nežádejte výjimek z tohoto opatření. Ztěžujete nám tím naši práci.

BRILAJ ĈEĤOSLOVAKAJ INSIGNOJ esperantaj (tipo Bartošík – kun ĉs. flago) estas ree haveblaj kaj malplikaraj. Unu insigno kostas nur Kčs 3,80 egale ĉu kun pinglo, broĉo aŭ butono. X

Simplejlaj insignoj emajlitaj Kčs 2,70 X

BUSTO DE NIA MAJSTRO

de akademia skulptisto Josef Paša, 16 cm alta bakita argilo Kčs 35,-- X

NOVAJ GLUMARKOJ:

70 jara jubileo de Esperanto

kaj

30 jaroj de Internaci Esperanto-Muzeo Wien

5 folietoj Kčs 2,50 X

Objednávky na adresu:

Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

dif	LOGIKA BAZO DE VORTFARADO (Antido 1910)	2,--
	PROPAJ NOMOJ EN ESPERANTO (Christaller)	1,--
	KOMPLEMENTOJ DE L' SUBSTANTIVO (Quarello)	3,--
	LERNU ESPERANTON	3,--
	PENSOJ DE ZAMENHOF (kvarlingva)	3,--
dif	AZ ESZPERANTÓ NYELV (Szilágyi, hungara)	3,--
	KURZGEFASSTE GRAMATIK DER ESPERANTO	1,--
	VORTARO DE OFICIALAJ RADIKOJ (Boirac)	2,--
	2000 NOVAJ VORTOJ (Boulet – 1908)	8,--
	UNUA OF ALDONO AL UNIVERSALA VORTARO	5,--
dif	ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO Ila volumo broŝurita – sen ilustraĵoj	50,--
dif	ENCIKLOPEDIO DE ESPRANTO Ila volumo broŝurita – kun la ilustraĵoj	80,--
dif	ARMENA ELDONO de Universala vortaro de la lingvo Esperanto	8,--
dif	Wörterbuch Esperanto-deutsch (Jürgensen)	6,--
dif	LEXIKON deutscher Redensarten bearbeitet und in Esperanto (W. Velten)	7,--
	WÖRTERBUCHBAUSTEINE aus Goethes „Gewchwister“ und Schillers „Räuber“	1,--
	EL LA HISTORIO DE ESPERANTO (1906)	2,--
dif	HISTORIO DE LA LINGVO ESP. (Privat)	5,--
	KONGRESAJ PAROLADOJ DE Dro L. L. Z.	3,--
	DEVENO KAJ HISTORIO DE E. (1908)	1,50
	SPEGULO HOMARANA (Erkko)	3,--
	AVENTURO EN LA NOVJARA NOKTO (Zschonke)	3,50
	HAMLETO (Shakespeare – Zamenhof)	10,--
	KONDUKANTO DE INTERPAROLADO (Grabowski)	6,50
	BUKEDETO DE DIVERSNACIAJ RAKONTOJ	2,--
	SES NOVELOJ EL LA HUNGARA LITERATURO	2,--
	ETERNA BUKEDO (Kalocsayi – broŝurita)	30,--
	TRA LA MONDO. Int. legolibro de Paul Bennemann (du partoj)	12,--
nova	POLLANDO – belega ilustrita revuo po numero havebla. En nuna momento estas haveblaj ĉiuj ĝis nun aperintaj numeroj po 4,-- Kĉs afrankite	
nova	KOLEKTO DE 12 FOTOBILDKARTOJ kun esperanta teksto. Unuarangaj bildoj prezentas diversajn lokojn el Ĉeĥoslovakio (Praha, Karlovy Vary, Doksy, Gigantmontaro, Brno, Olomouc, Ostrava, Moravia Slovakio, Bratislava, Tatroj, Košice, Domica). Unu serio en plaĉa kovrilo Kĉs 10,-- X Bonega donaco por viaj eksterlandaj geamikoj!	

Ni peros al Vi abonon de jenaj revuoj:

NORDA PRISMO. Kultura, socia, literatura revuo, parte ilustrita. Jara abono

Kĉs 22,--

NICA LITERATURA REVUO. Jarabono Kĉs 10,--

NUNTEMPA BULGARIO. Jarabono Kĉs 7,30

ESPERANTO – revuo internacia: abonebla nur al membroj de UEA!

Fariĝu membro de la UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO!

La kotizoj por unuopaj membrokategorioj:

Kĉs 25,-- por membro kun jarlibro (MJ)

Kĉs 50,-- por membro abonanto (MA). Tia membro ricevas jarlibron kaj la revuon ESPERANTO. – Ĉar la unuaj numeroj de ESPERANTO estas jam plene elĉerpitaj, la kotizo estis malaltigita al Kĉs 37,50, ĉar novaj nunjaraj membroj ne plu ricevas la unuajn kajerojn. Tiu ĉi escepto validas nur por la nuna jaro kaj nur por novaliĝintoj.

Klarigo: FOTOBILDKARTOJ, serio de 12 bildoj kun kovrilo NE kostas kiel antaŭe erare ni informis (en la lasta Bulteno) Kĉs 13,--, sed nur Kĉs 10,--. Pardonu tiuj, kiuj en la komenco pagis tiuj belajn fotobildojn pli multekoste. La eraro ne kaŭzis ni, sed nia liveranto. Al ĉiu, kiu aĉetis tiun ĉi bildkolekton por malĝusta pli alta prezo, ni resendos Kĉs 3,--, kiujn li tropagis, se li anoncos sin. Por propagandaj celoj ni uzos la tropan de tiuj, kiuj ne postulos redonon de tiu sumo.
